

N. N. 01,  
Das Nikolauslied

Laßt uns froh und munter sein  
und uns in dem Herrn erfreun!  
Lustig, lustig, tralala-lala!  
Bald ist Niklausabend da!

Dann stell' ich den Teller auf,  
Niklaus legt gewiß was drauf.  
Lustig, lustig, tralala-lala!  
Bald ist Niklausabend da!

Wenn ich schlaf', dann träume ich:  
Jetzt bringt Niklaus was für mich!  
Lustig, lustig, tralala-lala!  
Heut' ist Niklausabend da!

Wenn ich aufgestanden bin,  
lauf' ich schnell zum Teller hin.  
Lustig, lustig, tralala-lala!  
Nun war Niklausabend da!

Niklaus ist ein guter Mann,  
dem man nicht g'nug danken kann.  
Lustig, lustig, tralala-lala!  
Nun war Niklausabend da!

...

N. N. 01,  
La Nikolao-kanto  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Gajaj estu ĉiuj ni,  
ĝoju ni pri nia Di'!  
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!  
Baldaŭ venos Nikola'!

Dum la nokto venos li,  
la teleron metas mi.  
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!  
Baldaŭ venos Nikola'!

Kaj dormante songas mi:  
Dolĉajn aĵojn donas li.  
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!  
Venas Sankta Nikola'!

Ekstarinte vidas mi, )  
ke jam venis tiu ĉi.  
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!  
Venis Sankta Nikola'!

Ĉiuj devas danki lin,  
ĉar li regalegis nin.  
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!  
Venis Sankta Nikola'!

...

N. N. 01,  
Baldaŭ sopirata tag'  
*tradukita de Joachim Gießner*

Baldaŭ sopirata tag',  
Nikola' kun sia ag'.  
Ĝoju, ĝoju, traleralera,  
Baldaŭ venos Nikola'.

Ŝuon mi pretigos ja,  
Ĝin plenigos Nikola'.  
Ĝoju, ĝoju, traleralera,  
Baldaŭ venos Nikola'.

Ofte nokte songas mi,  
Kion eble donos li.  
Ĝoju, ĝoju, traleralera,  
Baldaŭ venos Nikola'.

Frue mi rigardos, ĉu  
Estos io en la ŝu'.  
Ĝoju, ĝoju, traleralera,  
Baldaŭ venos Nikola'.

Nikola', mi dankas vin,  
Ĉar vi tre ĝojigis min.  
Ĝoju, ĝoju, traleralera,  
Baldaŭ venos Nikola'.  
Nun jam venis Nikola'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 01.*

*Arg-93-188 (2012-10-11 09:11:25)*

*Vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Lasst\\_uns\\_froh\\_und\\_munter\\_sein](http://de.wikipedia.org/wiki/Lasst_uns_froh_und_munter_sein).*

*Traduko de la Germana poemo “Das Nikolauslied” de N. N. 01 en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-93-189 (2003-12-10 22:20:06)*

*Traduko de la Germana poemo “Das Nikolauslied” de N. N. 01 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-93-1224 (2012-10-10 22:50:59)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim\\_Giessner](http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner). Kolekto de kanto-tradukoj troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>.*